Plemenné motivy v mezinárodním jazyce. Vídeňský universitní profesor dr. *Theodor Fuchs* zaslal nám zajímavý polemický spisek *Esperanto und Ido*, jehož jádrem jest kritika zásad novější mezinárodní řeči *ido*, dnes odpůrkyně původnějšího, a jak se vůbec podobá, praktičtějšího *esperanta*. Nemíníme se spornou otázkou podrobněji zabývati, ale upozorňujeme pouze na dvě věci, jež stoupenec Zamenhofův vytýká idistům se štýrskohradeckým profesorem Pfanndlerem v čele. Stoje na základě přísně mezinárodním, vyčítá dr. Fuchs idistům nepoměrné nadržování latině, které činí ido nesnadným pro ty, kdož latinsky neznají a pokračuje: »Nevím, nemýlím-li se, ale zdá se mně často, že se v idistickém hnutí jeví jakýsi antisemitský rys a především hluboká nechuť proti všemu slovanskému a to je při podniku s mezinárodními snahami ovšem pochybené. Idisté perhorreskují četné zvuky s **aj** a **oj** v esperantu, prý že jsou nehezké a mají »židovský« ráz, a přece v staré řečtině, kterou idisté tak velebí, naskytá se **aj** a **oj** neméně často. Idisté perhorreskují dále četné sykavky v esperantu a právě tyto sykavky dodávají líbeznosti jazykům slovanským.

Při mezinárodním jazyku světovém jest mínění Slovanů daleko více rozhodující než mínění všech idistických akademiků«. Tento zajímavý úryvek polemiky mezinárodních esperantistů a mezinárodních idistů potvrzuje jen staré přísloví: »Naturam expellas furca, tamen usque recurret«.

Přehled 9. VI. 11. (IX, 37, 570-1).

ZPRÁVY SPOLKOVÉ.

Zkouška z esperanta. Před pražskou zkušební komisí »Svazu čes. esp.« (pro král. České) vykonal dne 11. června 1911 zkoušku způsobilosti vyučovati esperantu p. Alois Pazdera, studující gymnasia z Pelhřimova.

Česká společnost esperantistů v Praze konala 28. III. 11 svou IV. řádnou valnou schůzi za předsednictví p. adj. Krause a za poměrně slabé účasti členstva. Po schválení protokolu o schůzi minulé přečteny pečlivě sestavené zprávy funkcionářů. Ze zprávy jednatelské budiž uvedeno: Odbývány byly pravidelně týdenní členské schůze, jichž programem byly esperantské přednášky a přednesy, společné překládání a vespolná konversace, čtení a společenské hry; ze schůzí posílány pohlednice do celého světa, na něž došly odpovědi tvořící zajímavou a bohatou sbírku; společnou prací byla vzorně přeložena jedna z Erbenových pohádek a překlad uveřejněn v »Čes. esp.«; pro členstvo uspořádány 2 konkursy v překládání; větší přednášky přednesli pp. Barvíř (Mia vojaĝo), Berger (Spiritismo, Nevidebleco, Akvo, Aero, Fajro, Tero, Maté-Berger), Hromada (Impresoj el Augsburg) a Schmidt (Aerveturiloj); různými zprávami a vyprávěním rozmanitých zajímavostí oživovali schůze pp. Barvíř, Berger, Biskup, Bouška, Schmidt, Stejskal a Vašátko; uspořádán (13. XII. 10.) Zamenhofův večer s přednáškou p. Schmidta s bohatým programem; pořádán (9. III. 11) se spřátelenými pražskými spolky zábavní večer; pořádány výlety do Liboce a Chuchle; poslán kolem světa pás pohledů s popisem Prahy; uspořádán kurs pro mag. úředníky (učitel p. Stejskal), veřejný kurs pořádán nebyl; nahodilou koupí značně obohacena knihovna; opatřena tabulka na dům, spolkové papíry a obálky (darovala sl. Crhova) a zakoupena skříňka na knihy; známost o společnosti rozšířena ve světě zprávou p. předsedy zaslanou delegátům U. e. a. při anketě o adresářích. Zpráva byla schválena stejně jako následující zprávy pokladníka, revisorů a revuisty, načež výboru udělena absolutorium. Členský příspěvek na příští rok stanoven na 2 K. Projednán přípis vinohradského klubu esp. o sporu mezi čes. esperantisty a usneseno podporovati návrh na smír ve smyslu přípisu. Přijat volný návrh (p. Vašátko) směřující k čilejšímu pěstování esp. na schůzích. Zvoleni do správního výboru pánové a dámy: Kraus (předs.), Biskup (místopř.), Berger (jedn.), Koutek (pokl.), Crhova (knih.), Loucký (rev.), Stejskal a Vašátko, za náhradníky pp. Chaloupecký a Medáček a sl. Fiedlerova a Klírova, revisory pp. Houdek a Schmidt.

Klub esperantistů v Ruzýni. Esperanto na svém vítězném postupu zavítalo i do malé obce Ruzýně. Po přednášce p. H. K. Boušky (12. II. 11. v host. p. Houšky) a po několika týdenních přípravách svolána byla na 14. května 1911, ustavující valná hromada »Klubu esperantistů v Ruzýni«, kterou navštívili esperantisté z Malé Strany, Liboce a z Červ. Újezda. Po přivítání hostů panem Houškou, vyslovil p. J. Iglauer z Prahy pozdrav za »Svaz českých esperantistů« a přál valné hromadě jakož i další naší činnosti mnoho zdaru, načež přikročeno k programu: I. Volba výboru: předsedou zvolen p. Houška, místopř. p. V. Zajíc, jednatelem p. J. Pulec,

pokladníkem p. J. Beran. II. Čtení stanov: jelikož stanovy byly již známy, byly schváleny bez čtení. III. Stanovení příspěvků: ustanoveno 20 haléřů zápisné a 60 hal. půlletní příspěvek. IV. Přijímání členů: čestnými členy zvoleni: pp. Dr. L. Zamenhof z Varšavy, Th. Čejka z Bystřice a pan Fr. Zelenka, úředník z Liboce, který z ochoty v klubu esperantu vyučuje. Po vyčerpání programu přednesla sl. Kasalická z Prahy esperantskou básen »La hejmo«, jakož i ostatní pp. hosté z Prahy přispěli k obveselení přítomných zdařilými přednesy. Pak začal taneční vínek. Jest si přáti, by obětavost všech, kdož k založení našeho klubu přispěli, byla zdařilou prací odměněna.

Český dělnický spolek esperantistů ve Vídni (Bohema laborista esperantista societo), letos založený, má své sídlo v Lerchenfelderstr. 67 (Vídeň VII.) Kurs vede p. V. Jaroš.

Z mimosvazových spolků čes. esperantistů. — *Klub esperantistů na Kladně* konal (12. II.) II. valnou hromadu na níž zvoleni do výboru: O. Kočí (předs.), J. Podrázký (místopř.), Fr. Stříbrzký (jedn.), Fr. Novotný (pokl.), Al. Niederle (účetní), Brož (zap.), Šrámek (knih.), R. Nový (arch.), M. Šulcova (rev.); klub konal přednášku a koncert (6. IV. 11), kursy esp. pro začátečníky (v úterý) i pokročilé (ve čtvrtek) ve škole u sv. Floriána a podniká vycházky do okolí (v neděli). — *Klub esperantistů v Kuklenách* pořádal 24. VI. 11 o 1/28 večer ve dvoraně hot. »Černý kůň« přednášku o esp spojenou s pěvecko-hudební akademií. Na thema »Esperanto a esperantismus« přednášel p. K. Procházka, zem. úř. z Prahy, načež následovalo 10 čísel hudebních a pěveckých, mezi nimiž byly dvě esperantské písně (R. Dezo: Esperu! Mi amas vin) a dvě recitace v esp. Dr. Schulhof: J. A. Comenius, Printempa kanto). Po programu bylo slosování knih. Večer konán byl při zařízení restauračním při vstupném 50 hal. a byl oznámen velikými plakáty.

Pro propagační fond S. č. e. (V. výkaz) věnoval »Klub esp. v Bystřici p. H.« K 16·50, sl. Julie Šupichova, učitelka v Praze, K 5·— a p. Th. Čejka v Bystřici p. Host. 150 exemplářů své »Úplné učebnice esperanta« v krámské ceně 225 K (jak svaz cenného daru použil, referujeme jinde). Pamatujte při každé příležitosti na propagační fond!

LIBROJ KAJ GAZETOJ.

La unua libro de Biblio (*D-ro L. L. Zamenhof: Genezo*). D-ro Zamenhof entreprenas valoran kaj meritplenan laboron, traduki el la hebrea originalo la kolekton da malnovaj legendoj kaj poeziaĵoj de antikvaj Hebreoj, kiuj sub la nomo de »Malnova testamento« fariĝis esenca parto de la religioj hebrea kaj kristanaj. Post »Psalmoj«, »Predikanto«, kaj »Sentencoj de Salomono« (kiujn ni ne ricevis) eliris la unua el kvin libroj (»Pentateuch«) de Moseo »Genezo« (Genesis), per kiu D-ro Zamenhof komencas sisteman tradukon de la tuta »Malnova testamento«. D-ro Zamenhof estas certe la plej kapabla por doni al la esperantistaro tradukon klasikan, kian oni postulas ĉe Biblio, kaj la jam elirintaj partoj montras, ke li plenumos sian taskon bonege; lia traduko vere allogas la leganton per sia ĉarme simpla kaj klara stilo. Ni rekomendas al ĉiu esperantisto legi la esperantan tekston de Biblio kaj kompari ĝin kun la teksto en sia gepatra lingvo; certe multegaj personoj legos tiun ĉi »Sanktan skribaĵon« la unuan fojon kaj ĉiu profitos per tiu ĉi legado. La traduko de Biblio estis rimarkinda kaj ŝatata faro en ĉiuj literaturoj, en kelkaj nacioj (ĉe Bohemoj, Germanoj k. s.)

ĝi estis grandega epokfaranta okazaĵo literatura, kaj ĝi estas signifoplena kaj fruktodona entrepreno ankaŭ por la esperantaj lingvo kaj literaturo. Ni ĝin ŝatu laŭmerite! *Bšk.*

Libro pri la paco, forto kaj feliĉego *(Ralph Waldo Trine-Frederik Skeel-Giörling: En harmonio kun la eterneco).* En la lastaj jaroj havis grandegan sukceson en Ameriko kaj poste ankaŭ en aliaj landoj verko de R. W. Trine »En harmonio kun la eterneco« (titolo de la bohema eldono: V souzvuku s nekonečnem), kiu altiris multegon da adeptoj al tiel nomata »nova penso«. Trine instruas, ke pensoj estas fortoj, per kiuj ni konstruas nian propran mondon, kaj ke per laŭcela direktado, konstanta kontrolado de pensoj oni povas antigi ĉion, se oni volas kaj scias uzi siajn pensojn; laŭ li por vivi normale, feliĉe, oni devas konscii sian identecon kun la dia esenco, kun la universo (Trine estas panteisto) kaj agi harmonie kun ĝi. Sian simplan recepton por tio, kiel fariĝi feliĉa, li ankaŭ tre simple kaj populare klarigas, tial lia libro estas agrabla legaĵo, el kiu ĉiu pensema homo, eĉ tiu, kiu ne aprobas la teorion de l' optimista aŭtoro, povas ĉerpi rimarkindajn instruojn por la praktika vivo. La angla originalo estis tradukita en ligvojn francan, germanan, hispanan, italan, svedan, danan, holandan, boheman, magiaran, japanan kaj fine en esperanton. La esperanta traduko farita de la bonega, antaŭ nelonge mortinta, esperantisto Skeel-Giörling, estas tre bona, klara, facile legebla. La ekstera aranĝo de la libro estas vere eleganta kaj luksa, nekutima ĉe esperantaj eldonaĵoj. Estas ĝoje rigardi kaj legi tiun ĉi verkon — ĝi multe plezurigis nin kaj plezurigos certe ĉiun, kiu ĝin legos. *Bšk.*

Rakonto de mortinto *(René Vermandere-Oscar Van Schoor: Formortinta Delsuno.)* En sia verko »Van Zon Zaliger, door hem zelf« (Formortinta Delsuno, rakontita de li mem; Zesnulý pán ze Sluníčků, vypravováno jím samým) la flandra literaturisto René Vermandere rakontas en 17 ĉapitroj ĉion, kio okazis al la mortinta sinjoro Van Zon (Delsuno), iu panisto el lia kvartalo, de la momento, kiam tiu ĉi ĉesis spiri, ĝis kiam la tombisto starigis la krucon sur lian tombon; la mortinto estis amiko de l'aŭtoro kaj li post sia morto aperis antaŭ la aŭtoro kaj rakontis al li sian historion. La rakonto enhavas jen kortuŝantajn jen humorplenajn paĝojn, kiuj allogas la leganton per strangaj detaloj, kuriozaj ideoj, filozofiaj sentencoj, fantaziaj rimarkoj. La esperanta traduko de s-o Van Schoor estas tre bonstila kaj ĝenerale facile legebla spite kelkaj nekutimaj (ne ĉiam malbonaj) esprimoj (46 ekspozata, 48 spruĉanta fonto, 58 recevi, 63 superpozita, 75 steloza, 78 spruĉanta deziro, 86 remarki, 95 deĉas ekparoli ktp.). Laŭ la gramatika vidpunkto eraro estas eligado de la finiĝo *-n* en atributo (20 forgesi min, mizer*a* malfeliĉulo, 23. ĝojigi min, mizer*a* panisto, k. a.). Nekompreneble estas ankaŭ, kial la titolo ne estas simple: Mortinta Van Zon aŭ M. De l' Suno. La ekstera aranĝo de la verko estas vere bela; ĝi estas zorge presita sur bona forta papero per belaj literoj kaj ornamita per originalaj lignogravuraĵoj. Konklude ni povas aserti, ke la libro kiel pro sia interesplena enhavo tiel pro sia bona stilo estas tre rekomendinda. Precipe ni rekomendas ĝin pro tio, ke la eksterbelgiaj legantoj konigos al si nekonatan, sed bonan aŭtoron, kaj interesajn morojn kaj kutimojn belgiajn. *Hmd.*

Magiaraj rakontoj *(M. Jókai-J. de Luczenbacher: Du noveloj).* El du verkoj de la magiara poeto, romanverkisto kaj publicisto Maurus Jókai (1825—1904), el liaj »Militaj batalbildoj« kaj el la serio »Kiaj estas la virinoj«, s-o de Luczenbacher esperantigis du novelojn: »La edzino de l'falinto« kaj »Pola rakonto«. La unua rakontas pri l'edzino de magiara kapitano, en la ribelo mortigita de aŭstria oficiro, kiu forprenis lian fianĉringon; ŝi sopiras venĝi, longe kaj klopode ŝi penas mortigi la oficiron, sed kiam ŝi povas fordoni lin al magiaraj batalantoj kiel spionon, ŝi grand-

anime pardonas al li. La dua priskribas aventurojn de juna pola nobelo mortiginta rusan generalon, kiu kaŭzis la morton de lia edzino; la nobelo forveturas Paris'on kun franca kantistino, ili edziniĝis en neordinaraj cirkonstancoj, devis venki multajn malhelpaĵojn kaj minacojn, ĝis ili trovis la feliĉon en la alia lando. La ambaŭ noveloj estas interesplenaj, sed la traduko ne estas tro klara kaj ne tro bona. La tradukanto tro uzas longajn vortojn (22. kunenĉarpentitaj, 23. ekbrulegadanta, 57. personĉirkaŭskribo, 85. korpgardistĉasista suboficiro k. s.), nekutimajn esprimojn (49.50 alio, 72. tie ene, 36. etampleksaj sciigoj, elen el la arbaro, enen, k. s.) kaj vortojn kun ŝanĝita senco (73. trakti, 83. publikigi, 91. ekscitita ktp.) Sed malgraŭ tio la legado estas agrabla. *Hmd.*

Poemoj pri l' esperantismo *(D-ro Stan. Schulhof: Per espero al despero).* Ekzistas multaj personoj (mi ne apartenas inter ilin), kiuj amas legi esperantajn poemojn, tial estas bone, ke ekzistas ankaŭ esperantistoj (kaj ili estas — bedaŭrinde — tre multenombraj), kiujn plezurigas verkadi aŭ tradukadi poemojn en esperanto. La kvanto da esperantaj poemoj, ĉu originalaj ĉu tradukitaj, estas jam granda, kion oni ne povas absolute diri pri ilia kvalito. Al tiuj samideanoj, kiuj pliriĉigas la esperantan poezion, aliĝis ankaŭ bohema esperantisto s-o d-ro Stan. Schulhof, dentkuracisto en Pardubice. Lia unua poezia verko en esperanto estas kolekto da dek originalaj poemoj eldonitaj sub la titolo »Per espero al despero«. La poemoj traktas pri l' esperantismo kaj ĝia interna ideo; la poeto bonvenigas la verdan stelon de l' esperantismo, la novan senton venintan en la mondon per la esperantismo, kantas pri siaj idealoj kaj revoj pri la harmōnio, kiun povus doni esperanto al la homaro, sed tamen li ne kredas, ke venos tia bela tempo, pri kia li revas. «En eterna monda karuselo vi, Espero, restos ĉiam stelo, ĉiam malproksima por la homaro« antaŭdiras la poeto pesimisme. Per tiu ĉi pesimisma karaktero la verko de s-o Sch. tute malsimilas ĉiujn ĝisnunajn poemojn pri l' esperantisma ideo, ĉiujn ĉi naivajn dolĉoplenajn rimaĵojn pri la bela tempo, kiu venos tiam, kiam esperanto estos farinta el ĉiuj homoj pacemulojn, »unu grandan rondon familian«. Ĝenerale la verko laŭdinde malsimilas la grandegan plejmulton da esperantaj poemoj per tio, ke ĝi vere enhavas ideon, eĉ se tiu ĉi ne estas motivita kaj simpatia. Sed, se ĝi simpatie malsimilas aliajn poemojn esp. per tiu ĉi trajto, per la enhavo, ĝi tute similas ilin laŭ sia formo, kiu neniom kontentigas kaj montras negrandan sperton, kvankam ankaŭ en tiu ĉi rilato ĝi superas multajn aliajn versaĵojn; ankaŭ laŭ la lingva vidpunkto la libreto ne estas neriproĉebla. Tamen estas sendube, ke la verko de s-o Sch. plaĉos al ĉiu esperantisto, kiu serĉas la esperantan poezion, kaj, ke ĝi tre utilos al ĉiuj, kiuj serĉas taŭgajn deklamaĵojn. Ni rekomendas tiun ĉi tre bele kaj elegante eldonitan libreton al ĉiuj niaj legantoj, kiuj amas la esperantan poezion, kaj ne havas la okazon legi poemojn en nia revuo (ĉar ni preferas pli utilajn aferojn); ili estos certe tre kontentaj. *Bšk.*

Humorajo por la infanoj *(Levis Carrol-E. L. Kearney: La aventuroj de Alicio en Mirlando).* La angla verkisto Lewis Carroll rakontas en sia verko »La aventuroj de Alicio en Mirlando« (1865) pri strangaj aventuroj de knabino Alicio, kies alto ŝanĝiĝas laŭ tio, ĉu ĝi manĝas aŭ trinkas sorĉan manĝaĵon aŭ trinkaĵon. La aŭtoro rakontas pri ŝiaj vizitoj ĉe diversaj bestoj kaj birdoj, ĉe dukino vartanta porkinfanon, pri trinkado kun Martleporo, Ĉapelisto kaj Gliro, pri la stranga kroketludo ĉe Kera Damo, pri la vizito ĉe Falsa Kelonio kaj pri ŝia partopreno en la reĝa juĝo pro ŝtelitaj tortoj. Laŭ la antaŭparolo la libro de Carroll havis grandan sukceson, oni vendis pli ol 600.000 ekzemplerojn en la angla lingvo krom kelkaj miloj en la tradukoj franca, germana kaj itala. Kredeble ĝi estos

multe legata ankaŭ en la esp. traduko; sed, ĉu de l' infanoj, ni ne scias. La traduko de s-o Kearney estas bona; ni rimarkis, ke la tradukinto atentplene uzas la distingon inter igi, igi sin kaj iĝi. *Hmd.*

Rakontoj el Ekstrema oriento *(Ĉif. Tosio: Japanaj rakontoj).* S-o Ĉif Tosio kolektis kelkajn japanajn fabelojn kaj rakontojn tradukitajn de diversaj japanaj esperantistoj kaj aperintajn en »Japana esp.« (1907—1909) kaj publikigis ilin en la konata »Esperanta biblioteko internacia« sub la simpla titolo »Japanaj rakontoj«. La libreto enhavas sep belajn specimenojn de malnova kaj nova, popola kaj arta japana prozo. La libreto tre allogas la intereson de la leganto per sia enhavo, sed ĝi ankaŭ plene kontentigas la leganton laŭ la gramatika kaj stila vidpunktoj; la tradukoj estas vere bonaj kaj facile kompreneblaj, kio estas akcentinda, se oni konscias, ke la tradukantoj apartenas al tute malsimila kulturo ol estas tiu, el kiu naskiĝis la traduka lingvo. Tiu ĉi fremda kultura mondo parte malfermiĝas antaŭ viaj okuloj, se vi legas la libreton. Legu ĝin! *Bšk.*

Bulgaraj rakontoj *(Ivan Minčev Vazov-At. D. Atanasov: En Pirin. Tra la montkurbaĵoj. Obstinulo. Perdita vespero. La bruligitaj garboj).* La unua persono, kiu enportis en la bulgaran poezion nacian elementon kaj starigis la bulgaran verkadon sur la memstaran fundamenton, estis la ĉefa bulgara poeto kaj beletriisto Ivan Minčev Vazov (nask. en 1850, vivanta en Sofia), aŭtoro populara kiel en sia patrujo tiel en la fremdlando. El la verkoj de tiu ĉi verkisto, kies plej valora verko estas la romano »Pod igoto« (Sub la jugo), s-o Atanasov tradukis kvin mallongajn rakontojn en esperanton. La rakontoj estas bone elektitaj kaj bone tradukitaj. Jen la valora profito el esperanto: la homoj de ĉiuj nacioj facile povas konatigi al si la verkojn el la malmulte konataj, sed tamen rimarkindaj literaturoj, kaj la malgrandaj nacioj havas poveblon konatigi al la tuta mondo sian literaturon, kiu restus plejparte nekonata al la mondo. *Bšk.*

Antikva rakonto pri l'amo *(Lucius Apulejus-Em. Pfeffer: Amoro kaj Psiĥe).* La plej bela verko de la latina verkisto kaj filozofo Lucius Apuleius (nask. en 126/132 post Kr.) estas humorsatira romano »Metamorphoseon libri XI. seu De asino aureo« (XI. libroj da metamorfozoj aŭ Pri ora azeno). Inter multaj epizodoj de tiu ĉi romano superas la kvara, ĉarma rakonto »Amor kaj Psyche«, kiu rakontante la historion de la amo de homdevena Psyche al dia Amor simboligas mistikmaniere la ardan sopiron de la homa animo pri kuniĝo kun dio. Tiun ĉi historieton tradukis en esperanton s-o Em. Pfeffer kaj oni povas diri, ke la esp. tradukon »Amoro kaj Psiĥe« (kial unu nomo estas kaj la alia ne estas esperantigita?) oni legas kun vera ĝuo ne sole pro ĝia alloganta enhavo, sed ankaŭ pro ĝia klara esperanta stilo. *Bšk.*

Frazaro por komerca korespondado *(J. Borel: Komerca korespondado).* Sub la titolo »Komerca korespondado« la bone konata samideano J. Borel donas kolekton da frazoj, kiujn oni bezonas skribante komercajn leterojn. La libreto ne enhavas la tutajn leterojn kiel la verkoj de Berthelot-Lambert (Komercaj leteroj), R. Sudria (Komerca sekretario) kaj O'Connor (Praktikaj komercaj leteroj), ĝi ne instruas redakti la leterojn, sed esprimi esperante ĉiujn parolturnojn de la komerca lingvo. Per tio la aŭtoro evitis la oftan ripeton de la samaj frazoj kaj povis en negranda libreto doni grandan materialon. La libreto eliris en la simpatia kolekto »Esperanta biblioteko internacia«, kiun rekomendi ni havis la okazon jam kelkafoje (III, 131, 178; IV, 31, 121; V, 117). *Bšk.*

Populara broŝuro pri higieno *(R. Stolle- J. Borel: Konsiloj pri higieno).* En »Esperanta biblioteko internacia« aperis broŝuro »Konsiloj pri higieno«, kiu enhavas 40 artikoletojn pri la plej oftaj malsanoj, pri la

rimedoj kontraŭ ili, pri la flegado de malsanuloj, pri la konduto por eviti malsaniĝon k. s. La libreto meritas la atenton kiel pro sia enhavo tiel pro la lingva flanko, ĉar la leganto povas ĉerpi el ĝi multajn gravajn konsilojn higienajn kaj lerni la plej bezonajn vortojn kaj frazojn medicinajn. *Hkb.*

Oficiala gazeto esperantista (III. 7) publikigas la nomaron de la anoj de Akademio kaj Lingva komitato laŭ la stato en la 1a de februaro 1911; laŭ ĝi L. k. havis 152 membrojn, kiuj reprezentas 17 lingvojn: anglan 28, boheman 4, finnan 2, flandran 3, francan 46 (!), germanan 16, hispanan 11, holandan 3, italan 5, japanan 1, katalunan 3, magiaran 4, polan 7, portugalan 5, rumanan 1, rusan 9, svedan 3. Estis eksigitaj tri membroj pro la kontraŭesperanta agado (Avilov, Jamin, Schneeberger). El la bohemaj membroj 2 eksiĝis (Grňa, Procházka), 2 estas konsiderataj eksiĝintaj (Holub, Hradil). *B.*

La Revuo (V, 5) en »Babilado« publikigas tradukon de l'interesa antaŭparolo al »Dictionnaire complet esperanto-français« de E. Grosjean-Maupin (vidu »Boh. esp.« V, 4, 61). Ni promesis publikigi ekstrakton el tiu ĉi verko, sed nun ni rekomendas legi la tradukon de »La R.« *B.*

Esperanto (VII, 100) starigas (Verto) kontraŭ la aperintajn teoriojn pri esperanto jenajn ideojn: »Ju pli mi pripensas esperanton kaj legas la pripensojn de aliaj teoriemuloj, des pli mi konvinkiĝas, ke nia lingvo estas samtempe teoria kaj praktika, apriora kaj aposteriora, filozofia kaj natura, analiza kaj sinteza, aglutina kaj kunfleksia, gramatika kaj sengramatika ktp. Esperanto estas internacie kaj neŭtrale elpensita lingvo, ke ĝi ŝajnas aparteni al ĉiuj lingvaj sistemoj kaj adaptiĝas al ĉiuj senpartiaj teorioj«. En la sama n-ro estas citaĵo el nia artikolo »Neŭtraleco de esp.« *B.*

Danubo (I, 5) malfermis la rubrikon »Krestomatio por infanoj kaj komencantoj«, en kiu s-o Roman Frenkel publikigas artikolojn por infanoj senditajn al li de diverslandaj esperantistoj. *B.*

La Marto (II, 2) raportas pri la stato de l' esperanta gazetaro dum la jaro 1910: en la komenco de la jaro ekzistis 84 esp. gazetoj; dum la daŭro de la jaro 24 gazetoj mortis, 19 novaj naskiĝis; en la fino de la jaro sekve ekzistis 79 gazetoj. La nombro de l' esp. gazetoj en la jaroj 1903—1910 estis: 13, 15, 17, 18, 30, 78, 84, 79; estas videble, ke en 1908 aperis tro granda nenatura nombro de la gazetoj kaj la sekvo estis kaj estas, ke ne ĉiuj povas vivi. *B.*

Monato. Gazeto esperanta ricevebla per Eldonejo Esperanto en Leipzig (Germanujo), Aŭgustenstr. 17 pr. Jarabono Sm 2·00. — Okpaĝa, enhave neriĉa gazeto eldonata jam la duan jaron monate. La ĉefa enhavo estas traduko de »Suferado de Werther«. *B.*

Internacia stenografia gazeto Gabelsberger (I, 2) raportas iom malplene pri la bohema stenografio kaj petas pri regulaj precizaj sciigoj pri ĝi. Ĉu iu el niaj legantoj povus fari tion? *B.*

Komerca bulteno. *Organo de la komerca fako de U. e. a.* Red.: W. A. Vogler, Hamburg (Germanujo), ABCstrasse 52. — Komerca fako de Universala esperanto-asocio komencis (en aprilo 1911) eldonadi sian organon, kiu enhavos interesajn kaj utilajn informojn el ĉiuj anguloj de la komerca mondo. »Komerca bulteno« eliras kiel senpaga aldono de la gazeto »Esperanto«, kiu nun kostas jare 2 Sm. La enhavo de la 1-a n-o estas: Evolucio de l'komerco en Hamburg, Eksporto el Odessa, La eksterlanda komerco de Rumanujo, Komerca movado en Genova, La produktado de stano en Bolivio, ktp. Laŭdinda entrepreno! *B.*

Dana esperantisto (IV, 1) post nevola intertempo komencis denove eliradi danke helpon de kelkaj amikoj; ĝi petas la apogon de fremdaj esperantistoj per abonado. *H.*

Franca esperantisto (III, 5) proklamas (F. E.: Non bis in idem) la absolute rifuzan vidpunkton al »Weltsprache-Amt« (Oficejo de l' universala lingvo) en Bern fondita (27. II. 1911) laŭ la modelo de »Konstanta internacia oficejo por la paco« post la konferenco okazinta (14. XI. 1910) en la Kazino de Bern por krei la unikan lingvon kaj labori por la oficiala alpreno de ĝi. *H.*

Le Monde espérantiste (IV, 2) komencas represadi la esperantan tradukon de la rakonto »Fantomoj« de Vladimir Korolenko. Tiun ĉi tradukon el la rusa lingvo faris unu el la plej malnovaj esperantistoj (Esperantisto Nro 4.) s-o V. Gernet kaj publikigis ĝin jam en la jaro 1895; la traduko estis jam longe nericevebla kaj nun ĝi estas renovigata per tiu represo farita por montri, ke al la malnovaj esperantistoj plene sufiĉis por bonaj tradukoj la vortradikoj el »Universala vortaro« sen la proponataj neologismoj. Sendispute estas aprobinda ideo (sen rigardo al la celo de tio), represadi malnovajn, precipe nericeveblajn, verkojn en esperanto; ili certe trovus multajn legantojn, kiuj en ili trovus multajn bonajn ekzemplojn. En la sama numero oni konstatas, ke s-o Gernet estas inter tiuj lingvakomitatanoj, kiuj »estas konsiderataj kiel eksiĝintaj pro nerespondodo al la leteroj senditaj al ili«, kaj la aŭtoro (La lamanta Diablo) indignas pro tio, ke oni »elbalaas« homojn, kiuj ne respondas la »neregulajn kaj maloftajn cirkulerojn«. Ni ne povas konsenti: se iu ne respondas eĉ »vagues et *rares* circulaires«, kion do li faras kaj kian laboron oni povas atendi de li? Kaj, se iu ne laboras — ĉu ne volante, ĉu ne povante — por tiu ne estas loko en institucio, de kiu oni postulas laboron, eĉ se li havus multajn gravajn meritojn. Por simple sidi senage sur siaj laŭroj, por tio ne estas »Lingva komitato«, kiu ĝis nun estas malkapabla por ĉia laboro precize pro tio, ke preskaŭ ĉiuj ĝiaj membroj estis elektitaj pro aliaj motivoj ol pro siaj kapableco kaj kompetenteco. Tial estas tute bone, ke oni purigas la komitaton per la forigo de mallaborantaj personoj, eĉ se ili estas meritplenaj kaj kapablaj, kaj estas malprave kontraŭstari tion. Ne estas bezone (kaj eble), ke ĉiu bona esp. estu L-k-ano. Oni povas ja esti bona esperantisto ne estante lingvakomitatano. Ankaŭ s-ro G. *H.*

Paris-esperanto (V, 46 k. p.) publikigas la respondojn al diversaj kontraŭdiroj pri esperanto. *H.*

Ardena stelo. Adr.: Charleville (Francujo), rue Baron Quinart 40. Jarabono Sm 0'60. — Kvarpaĝa societa bulteno sen iu ĝenerala intereso kaj signifo. *H.*

German-aŭstria esperantisto. Red.: Wien VII (Aŭstrio), Kaiserstrasse 10, Adm.: Wien VI, Dürergasse 19. Jara abonprezo Sm 1'25. — La oficiala organo de »Ligo de germanlingvaj esperantistaj grupoj en Aŭstrio« — unu el la malmultaj bonaj esperanto-gazetoj — kiu sub la nomo »Informaj raportoj« (antaŭe »Klubaj raportoj«) eliradis ĉiumonate kaj sole en esperanto, eliras nun (V. jarkolekto) kun la nova titolo »German-aŭstria esperantisto« sole dumonate (»konforme al nesufiĉa nombro de abonintoj«) kaj german-esperante. — En la 1a n-o estas rimarkinda propono (Rubĉiĉ: Fratoj!), priparoli la ideon, ĉu ne estus bele, se la aŭstriaj esperantistoj de ĉiuj nacioj havus komunan organon (»Aŭstria esperantisto«), en kiu la kunlaborantoj de ĉiuj aŭstriaj nacioj interŝanĝus siajn opiniojn, spertojn, konsilojn, proponojn ktp., per kiu ili unuigus siajn disigitan fortojn »formante unu grandan rondon familian en la vasta diversnacia aŭstria imperio«. En la rubriko »Tra aŭstriaj landoj« oni komencas la priskribon de l'aŭstriaj landoj. *H.*

Gazeto hispana. Oficiala organo de *Hispana societo p. p. esperanto.* Red. & adm.: San Fernando (Cádiz, Hispanujo), Str. Muñoz Torrero 10. Abonprezo Sm 1'20 jare. — Sub tiu ĉi titolo eliras nun, post

la malapero de la malnova »La Suno hispana«, antaŭa revuo »Gazeto Andaluzia«. *H.*

Ricevitaj verkoj (la steleto * montras la verkojn, pri kiuj ni raportas aŭ raportos) — Bossuet. *Funebra parolado* pri Louis de Bourbon, prince de Condé El la franca trad. L. Bastien. Paris 1911. Presa esperantista societo, rue Lacépède 33. Prezo Sm 0·40; pĝ. 69 (*). — Esperanta muzeo 10-2 *Ondino (Undine)* de Frederiko barono de la Motte Fouqué. El la germana trad. K. Myslik. Wien 1910. A. Schönfeld IX., Universitätsstr. 8. Prezo Sm 0·50; pĝ. 55(*). — Esperanta biblioteko internacia 17. *Konsiloj pri higieno* de R. Stolle. Trad. J. Borel. Berlin Möller ŭ. Borel. Prezo 0·10 Sm; pĝ. 42 (*). — 10-spesdeka biblioteko esperantista 1. *Kongresa parolado en Washington.* De L. L. Zamenhof. Leipzig 1911. Esperanto-propaganda instituto, Kaiser Wilhelmstr. 15c. Prezo 10 sd; pĝ. 24 (*). —10-spesdeka bibl. esp. 3. *Libro de kantoj de H. Heine* I. Leipzig 1911. Esp. prop. inst. Prezo 10 sd; pĝ. 24 (*). — *An die Esperantisten Deutschlands* (flugfolio de Ido Zentrale Berlin). — *Институтъ Эсперанто* (prospekto de Esperanto-instituto en Moskva). — *Esperanto-ekspozicio en Lwów* (flugfolio). *Rd.*

Ricevitaj gazetoj. — *Lingvo internacia.* (XVI, 5). — *La Revuo* (V, 9, 10): La vizio de Mirza (J. Adisson). Kunveno en London. Prediko de Rust. Esperanto-ludo. Venezia. (El »Řím« de J. S. Machar trad. Th. Čejka). Woldemar. T. Ševčenko. — *Esperanto* (VII, 101, 102): Landsmaal. Prahejmo de l' indo-eŭropanoj. — *Danubo* (I, 8); Kiamaniere Jesuo Kristo kreis la alaŭdon (Svačina). Bulonjaj rememoretoj. Pri propagando. — *La Marto* (I, 5). — *Internacia socia revuo* (V, 6). — *Virina bulteno* (I, 1). — *Gabelsberg* (I, 5, 6). — *La Kroniko* (I, 1). — *The British Esperantist* (VII, 78). — *Le Monde espérantiste* (IV, 5): SFPE rénovée. Por L'espero. Kiu falsis »Tutmondan jarlibron esp.?« (El »Boh. esp.«). Stranga kontrakto. — *La Dek-sepa* (I, 7). — *Tra la filatelio* (XII, 124. — *Germana esperantisto* (VIII, 6,): Int. reprezentantaro. Weltsprachamt. Esp. literaturo. — *Germana esperanto-gazeto* (IV, 19). — *Rund um die Welt* (II, 6): Welthilfssprachebewegung. Esp. ŭ. ido. — *Eĥo esperatista* (VI, 60). — *Mitteilungen G. E. D.* (III, 5). — *Monda poŝto* (XI, 2). — *Greklingva esperantisto* (III, 4). — *Nova sento* (III, 20, 24). Zamenhofaj esprimoj. — *Antaŭen esperantistoj!!* (VIII, 1, 2). — *Helpa lingvo* (I, 4). — *Esperanta penso* (I, 3). — *Cuba esperantisto* (II, 1). — *La Holanda pioniro* (III, 9). — *Kataluna katoliko* (I, 1). — *La Ondo de esperanto* (III, 5). *Rd.*

DIVERSAJ KOMUNIKOJ.

Literaturaj konkursoj okaze de la sepa kongreso esperantista (Aldono). Pluaj nove starigitaj konkursoj (v. »Boh. esp.« V, 7, 99): 18. Kanzono tuj komprenebla laŭ populara ario (arta objekto); 19. Priskribo de popolaj moroj aŭ Popolaj legendoj, proksimume 1000 vortoj (Sm 10, Sm 10); 20. Originala aŭ tradukita 5-8 paĝa verketo pri kiu ajn temo kun ekskluziva uzo de la radikoj el »U. v.« (12 Sm, 8 Sm); 21. Originala rakonto aŭ novelo, 4000—5000 vortoj (10 Sm); 22. La plej bona vojo al internacia organizo de esperantistaro, 16—20 pĝ. laŭ monoformato (20 Sm); 23. Praktikaj konsiloj por fondi grupon esperantistan, interesigi la gegrupanojn kaj vivigadi kunvenojn kaj instruadon (5 Sm). Nova, ŝanĝita templimo: 15. de julio 1911. Bohemaj esperantistoj partoprenu! *O. S.*

Zodpovědný redaktor H. K. Bouška. — Nakladatel Jan Iglauer. — Tisk »Politiky« v Praze.

RAPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

Pri la ŝovinismo skribis la konata dana kritikisto Georges Brandes en sia felietono verkita por rusa gazeto »Russkoje slovo« (Moskva): »En Rusujo — cetere kiel ĉie en Eŭropo — la nacionalismo plifortiĝas malgraŭ la disvastigado de interrilatoj kaj internacia solidareco. Estas mirinde, ke en neniu lando la nacionalistojn konfuzas la fakto, ke la nacionalismo ĉiulande atingis la saman nivelon. Jam en la antikva epoko nek Grekoj, nek Romanoj, nek Hebreoj iomete dubis, ke ili prezentas la nacion elektitan de la ĉielo. La sama ideo nun renaskiĝas, venkinte la kosmopolitismon de la XVIIIa jarcento. En Usono aperis la dogmo, ke la Usonaj lando kaj popolo estas la unuaj en la mondo, en Japanujo estas tute same, en Ĥinujo ankaŭ, en Anglujo — same, en Germanujo — same, ĉi tie kun aparta klareco. Neniu Italo kaj Greko dubas pri la supereco de sia popolo sole kaŭze de la nacia deveno. Eĉ en la malgranda Danujo ekzistas kredo, ke Danoj estas la plej favorata popolo de dio, ke Danujo estas lando, kiun dio necese bezonas por sia celaro. Kiam belga knabineto foje montris al mi sian geografian lernolibron, mi informiĝis, ke Belgio estas la plej kultura lando de la terglobo, havante la plej densan loĝantaron kaj plej superan industrion — kompare kun la grando de la teritorio. En Kristiania, dum konversacio kun universitata profesoro, mi ŝerce demandis: »En Norvegujo oni povas trovi multe da personoj, opiniantaj la norvegan popolon plej perfekta sole, ĉar ĝi estas norvega — ĉu ne?« Iom konfuzite la profesoro respondis: »Mi devas konfesi, ke mia opinio estas la sama«. (El »Lingvo internacia« XVI, 2, 85). Trad. *B. Kotzin.*

Afranko por respondo en la internacia korespondado (Atentigo). Se oni petas de fremdlanda persono ian informon aŭ servon, estas evidenta devo sendi al la adresato respondan afrankon, ĉu poŝtkarton ĉu poŝtmarkon. Se la adresato estas alilandano, estas senutile sendi al li respondan poŝtan karton aŭ markon de sia lando, ĉar li ne povas uzi ĝin kaj ordinare ne povas ŝanĝi ĝin en banko. Tial por la korespondado fremdlanden ekzistas jam de multaj jaroj specialaj poŝtkartoj por fremdlandaro (unuoblaj kaj duoblaj) kaj de kelkaj jaroj (de 1907) specialaj internaciaj asignoj por respond-markoj (tiel nomataj »internaciaj respond-kuponoj«) Se oni sendas al fremdlanda persono duoblan korespond-karton por la fremdlandaro, sur kies unua karto oni skribis sian korespondaĵon, la adresato povas respondi sur la alia karto. Se oni sendas al fremdlandano leteron kun enmetita internacia respond-kupono, li povas ŝanĝi la kuponon en ĉiu poŝtoficejo kontraŭ sialanda poŝtmarko bezona por afranko (en valoro 25 hel, 25 ctm, 25 pf ktp). Per respond-kuponoj enmetitaj en letero oni ankaŭ povas facile kaj oportune pagi malgrandajn sumojn eksterlanden (unu kupono valoras 25hel = 25 ctm ktp., kvankam ĝi kostas 28hel = 30 ctm ktp.). La internaciaj korespond-kartoj (en Aŭstrio unuoblaj po 10hel, duoblaj po 20h) kaj internaciaj respond-kuponoj (en Aŭstrio po 28hel) estas riceveblaj en ĉiu (en Aŭstrio ekskluzive en) poŝtoficejo. Uzante respond-kuponojn oni devas ĉiam atenti, ke ĝi estu ŝtampita de la poŝto (alie ĝi estas senvalora). Ni spertis, ke grandega mombro da personoj nenion scias pri tiu ĉi grava kaj praktika afero, tial ni sentis la bezon atentigi la samideanojn pri ĝi, sciante, ke la atentigo utilos al multaj legantoj. *Rd.*

Lernolibroj pri esperanto en lernejaj bibliotekoj. »Bohema asocio esp.« donace sendis al 150 mezaj (duagradaj) bohemaj lernejoj — gimnaziaj, realaj, pedagogiaj, industriaj, komercaj — detalan boheman lernolibron pri esperanto (de Čejka kaj Krumpholc) kun la peto, ke oni envicu ĝin en la bibliotekon por lernantoj de l' instituto kaj atentigu la studentojn pri ĝi. La plej granda parto da institutoj plenumis kompleze la deziron de »Bohema asocio

esperantista«, kelkaj eĉ tre afable respondis per speciala letero la petskribaĵon, en kiu la asocio priskribis la disvastiĝon de esp. en la lernejoj. Estas sendube, ke tiuj cent kvindek libroj gajnos multajn junajn adeptojn al nia lingvo kaj helpos al disvastigo de esp. inter la bohema studentaro. Ni plezure raportas pri tio; eble en aliaj landoj oni imitos tiun ĉi ekzemplon. *Bšk.*

PROBLEMOJ KAJ OPINIOJ.

Financa propono de idistoj al Zamenhof. Oni faris al d-ro Zamenhof riproĉon, ke li estas konservativa pro personaj, financaj motivoj, ke li kontraŭstaras la reformojn pro persona oportuneco. Respondante ĉi tiun akuzon (en »Oficiala gazeto esp.« III, 8, 251) d-ro Z. publike malsekretigas la fakton (pri kiu cetere malpublike rakontis informitaj personoj), ke kontraŭe financan profiton povus alporti al li la aprobo de reformoj, aliĝo al reformemuloj (idistoj), ĉar oni penis allogi lin, neriĉan kuraciston, per tre granda sumo da mono, kiu permesus al li tute forĵeti lian profesion, vivi tute oportune kaj feliĉe, kiu liberigus lin de ĉiuj zorgoj pri la morgaŭa tago kaj pri la estonta sorto de lia familio kaj kiu permesus al li fordoni sin plene kaj ekskluzive al siaj amataj idealoj. Al tiu malsekretigo d-ro Z. aldonas rimarkon: »La propono de mono ne estis ia malnoblaĵo de la flanko de la proponintoj, ĉar ili havis la plej bonan intencon; mia rifuzo ne estis ia heroaĵo de mia flanko, ĉar agi alie mi ne povis«. Kaj d-ro Z. konstatas, ke jam kelkafoje, kiam li opiniis, ke venis la ĝusta tempo, por fari la revizion de esperanto, li mem elpaŝis en lojala formo kiel iniciatinto, sed, ke li tuj, kiam li konvinkiĝis, ke tio alportos al la afero malbonon, retiris sin malgraŭ tio, ke oni penis allogi lin al reformoj per mono Ni reproduktas la komunikon de d-ro Z., ĉar estas bone per publika laŭvera klarigo ĉesigi la vastigadon de fantazioplenaj legendoj, multe da kiuj rondiras tra la mondo. *Hkb.*

Pri „Tutmonda jarlibro esperantista“ redaktata de s-o Chavet kaj eldonata de f-mo Hachette oni sciigas, ke ĝi ne aperos plu. La jarlibro povis esti tre utila kaj grava helpilo al esperantistoj, sed bedaŭrinde ĝi ne estis plenumanta sian bonan taskon tiel, kiel ĝi devis kaj povis. La libro, kiu konsumis multe da laboro kaj mono, enhavis tro multajn erarojn, mankojn kaj malverojn kaj tiamaniere ĝi fariĝis senvalora danke kelkajn mensogemajn kaj trompemajn kunlaborantojn kaj helpantojn, kiuj senkonscience malbonuzis la kredemon kaj senzorgemon de la redaktinto. Ni ne scias, ĉu tiuj sentaŭgaĵoj kaj bubaĵoj de tiaj kelkaj informintoj estas direkta kaŭzo de la malapero de la jarlibro, sed certe ni ne eraras opiniante, ke tiuj »laborantoj por nia sankta afero« maldirekte mortigis tiun ĉi eldonaĵon. Ni sincere bedaŭrus la morton de tiu eldonaĵo, se ĝi estus efektiviginta sian taskon, sed en la nunaj cirkonstancoj ni devas akcepti tiun ĉi fakton kun meritita »Requiescat in pacem« . . . *Bšk.*

Ideoj de d-ro Zamenhof kaj „B. u. e.“ »Leginte pri la ideoj de nia Majstro, ni rememoriĝu, en kia grado ili estas plenumitaj ĉe bohemaj esperantistoj« skribis »Č. č. e.« (V, 3). Nu bone, ni komparu — kion »Č. č. e.« forgesis fari: la aŭtoro citas, ke d-ro Z. (en »Č. č. e.« kompreneble »nia Majstro« kun granda M) »rekomendas tradukadi la naciajn klasikulojn« kaj s-o Kühnl tradukas — »Sherlock Holmes en servo de la hispana trono«. Jen, kiel s-o K. plenumas la ideojn de d-ro Z.! Senvalora humoraĵo de moravia ĵurnalisto estas verko, kiun la ĉefa reprezentanto de »B. u. e.« prezentas al la tutmonda esperantistaro kiel montraĵon el la bohema literaturo!... Difficile est satiram non scribere... *Bšk.*

Redaktoro: H. K. Bouška, Praha-Smíchov 730. — Eldonanto: Jan Iglauer, Praha III. 495. — Presejo: »Politika«, Praha. — Bohemujo-Aŭstrio.